Gonçalo Neves

Buĉado

Flugas inside droneo
(jen moderna portepeo!)
dum fotelas generaloj
spertaj pri nunaj bataloj.

Falas dom′, infan′ pereas,
dum ili pri pac′ eseas:
tiaj detruoj banalas,
novan taktikon signalas.

Ĉio estas krom-efiko:
regu geopolitiko,
recikligo de obusoj,
kaj ne manku la fondusoj.

Protestantoj nur laikas,
fakan scion ne aplikas,
pro naivo anĝelusas,
dum milit′ senĉese flusas.

Ŝajne logas muskovito
la avidon de l′ elito,
la cetero, senvalora,
restu ĉiam akcesora.

Se iu tamen profitas,
dum aliaj dinamitas,
la popolo laŭte ploras,
kanon-karne plu deĵoras.